


Super la Placo de Funebro altiĝas ŝutita monto – sanktejo. Defendantoj de la urbo estas entombigitaj ĉi tie. De la Placo al ĉefa monumento gvidas serpenta vojeto, laŭ kiu estas tomboplatoj. Kronas la ensemblon de Je. Vuĉetiĉ la skulptaĵo de patrino-hejmlando. Levante la glavon, ŝi alvokas al batalo kontraŭ malamikoj, al ilia forpelo de nia tero. Majesta figuro estas videbla de ĉiuj flankoj de la urbo. Ĝia alteco estas 52 m (entute 102m). La glavo estas 29 m longa.



135 tagnoktoj daŭris bataloj por Mamajev-monteto. Eĉ unu paŝon ne povis fari malamikoj, dum almenaŭ unu soldato estis viva. Ĉiuj batalantoj sciis vortojn: "Post Volgo por ni ne ekzistas tero!" La 26-an de januaro 1943 sovetaj militistoj okupis la pinton de la Mamajev-monteto. La batalon ĉe Stalingrado partoprenis ankaŭ multaj uljanovskanoj. Ni menciigu nur du el ili: I. Polbin kaj W. Ĥazov.



Ivan Semjonoviĉ Polbin (maldekstre) estis generalo de aviado kaj estris aviadan bombkorpuson. Titolon "Heroo de Soveta Unio" li ricevis dufoje (en 1942 kaj 1945), unuan fojon en Stalingrad.



Vladimir Petroviĉ Ĥazov, ĉefleŭtenanto, estris tankan roton. pereis ĉe Stalingrado la 13-an de septembro 1942 kaj estis entombigita sur Mamajev-monteto. Li ricevis titolon "Heroo de Soveta Unio" la 5-an de novembro 1942.

La germana armeo malvenkis ĉe Stalingrado. Pro elstara heroismo de la soldatoj dum la batalo la urbo ricevis honoran titolon "Urbo-Heroo"

Sur la suba foto estas esperantistoj el 3 urboj, kies E-klubo faris kune tiun faldfolion. Ili staras apud skulptaĵo, kies temo estas memoro de la generacioj. En ŝtono elĉizita estas la solena procesio de diversaĝaj kaj diversnaciaj homoj, irantaj por rememori pereintajn por ili heroojn.




La 9-an de majo 1970 sur la Placo de Herooj oni enmurigis la kapsulon kun la alvoko al la posteuloj. La 9-an de majo 2045 oni malfermos ĝin.

Aŭtoroj: Tatjana Vtorova, Margarita Karceva, Tatjana Iljutkina, Olga Terentjeva



## Stari ĝismorte!

Uljanovska Esperanto-klubo  
Volgograda Esperanto-klubo  
Dimitrovgrada Esperanto-klubo




La plej fama vidindaĵo de Volgogrado estas Mamajev-monteto, kie okazis plej grava batalo de Granda Patriota milito. En la jaro 1967 ĉi tie estis inaŭgurita memorejo omaĝe al defendantoj de Stalingrado.

Sur la titola paĝo vi vidas la skulptaĵon “La ordono – stari ĝismorte!” Soveta heroo-fortegulo leviĝas kvazaŭ el akvoj de la grandega rusa rivero kaj, defiante la morton, kontraŭstaras la faŝistojn kaj defendas naskiĝurbon. Li simbolas nian popolon.



El muroj-ruinoj kvazaŭ elstaras homaj vizaĝoj. Maldekstra parto de la muroj estas dediĉita al la ĵuro de stalingradanoj. La dekstra – al la stalingrada batalo mem.



Se mi pereos, konsideru min komunisto. Tiel skribis centoj kaj miloj de soldatoj, forirantaj al la batalo. En la partion estis akceptitaj 14 400 batalantoj. Muroj-ŝtonoj estas ŝtona libro, heroeca kroniko de tiu tempo.

### La Placo de Herooj

En la centro de la Placo estas granda akva parteroj. 6 skulptaĵoj reflektiĝas en la akvo.



La 1-a nomiĝas “Finteninte ĉion, ni venkis la morton!” La 2-a rakontas pri gloragoj de virinoj-flegistinoj dum la milito.



La 3-a estas dediĉita al maristoj. Unu el ili ĵetas sin kun grenadoj, preta venĝi pro mortintaj kamaradoj. La 4-a prezentas vunditan komandanton, kiu ĝis lasta momento ne forlasas batalkampon kaj daŭre direktas la batalon.



Standardisto pereis, sed la standardo ne rajtas fali. Ĝin kaptis alia batalanto kaj direktiĝas antaŭen. La 6-a estas alegoria skulptaĵo. Du sovetaĵoj likvidas faŝistan kanajlon kaj rompas svastikon.

### La halo de milita gloro



La enirejo similas blendajon. Sed post la turno subite vi vidas belegan brilantan per oro halon en formo de cilindro. 34 simbolaj ruĝaj standardoj, sur kiuj estas skribitaj 7 200 nomoj de militistoj, pereintaj en Stalingrada batalo. Meze de la halo estas mano kun torĉo – Eterna fajro. Honora gardo funkcias de la 28-a de januaro 1968.



Sur la Placo de Funebro estas kliniĝanta figuro de la virinopatrino (11m). Antaŭ la entombigo de sia filo ŝi ĉirkaŭbrakis lin kaj enprofundiĝis en funebron. La vizaĝo de la militisto estas kovrita per standardo. La skulptaĵo signifas la virinan proteston kontraŭ militoj, forprenantaj milionojn da viroj.